

HEROLDO

Eldono: Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.
Redakcio-Administracio: T. Jung, Harsténhoekweg 223, Scheveningen, Ned.
Abonkoto por la kuranta periodo (januaro-septembro 1947 = 9 monatoj):
Belgujo 100 fl., Nederlando 5.50 gld., cetere 2.50 dol. aŭ 10 angl. ŝil.
Anoncoj: 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fl. 20.—, gld. 1.— ktp.

DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 15 (1074)

FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO

15 Septembro 1947

Unika Mondkongreso en Bern

Unua postmilita kongreso internacia, kie ne ekzistis lingvaj baroj.
IEL-UEA denove kunigitaj. — Estis varmege en Shvitlando.

Unika estis la 32-a Universala Kongreso de Esperanto; ne nur ĉar ĝi estis la unua U.K. post la milito, ne nur ĉar ĝi solenis la kunfandiĝon de la du neŭtralaj asocioj, ne nur ĉar al ĝi aliĝis preskaŭ duoble tiom da kongresanoj kiom al la lasta antaŭmilita U.K., — sed ankaŭ ĉar ĝi estis la unua internacia kongreso en la mondo, kiu okazis post la milito sen lingvaj malfacilaĵoj.

La Kongreson aliĝis entute 1370 partoprenantoj el 35 landoj. Pli multaj anoncis sian aliĝon, sed pro la devizaj malfacilaĵoj ne sukcesis pagi sian kotizon. Okazis dum la kongresa semajno minimume 27 fakkunsidoj. Estis aranĝitaj sep diservoj, krom diversaj aliaj religiaj kunvenoj. Ĉiutage aŭdiĝis dekminuta Esperanta dissendo de la radiostacio Bern, kaj la tagĵurnaloj raportis pri la Kongreso ĉiutage.

La kvinta ekscito de la pacaj batalantoj rimarkigis unue antaŭ la Solena Malfermo kiel gaja murmura zumo de renkontiĝa babilado en la majeste luksa enirhalo de la kongresejo. Ĉie staris homoj bonvenigante unu la alian. « Ha, post ok longaj, teruraj jaroj! » « Finfine ni rerenkontiĝas! » « Nu do, ĉu fine vi sukcesis veni? » « Ĉu vi rememoras... » ktp. Ĉiuj ŝajnis de unu sola nacio, senĝene babilante. Vortoj fluis kiel akvo, kompreno estis kiel vido en sunlumo. Nur la svisaj bankaj kaj aliaj oficistoj tie spertis lingvajn malfacilaĵojn. Jes, la svisoj — kiuj ĉiam loĝas en Babilonujo — sentis lingvodolorojn!

La esperantistoj tamen, la amatoroj, helpis la svisajn Babilonspertulojn per tradukado. Tradukistoj por preskaŭ ĉiu lingvo oportune troviĝis inter ili, tial ke ili estis el multaj diversaj nacioj.


La Solena Malfermo okazis en la granda salono de la Kasino — halo kremkolora kaj orumita, kun la standardoj de diversaj nacioj fiksitaj ĉe la antaŭmureto de la galerio. Sur la plafono en bareliefo vidiĝis la di-figuroj de la antikva roma mitologio, kaj centre de la halo pendis grandega Verda Standardo.

Palbluaj kurtenoj fermis kurbe la malantaŭon de la estrado, sed lasis vidi, centre kaj malantaŭe, freŝajn verdajn arbustojn, kaj supre la svisan standardon. Aliaj freŝverdaĵoj pende ornamis la antaŭaĵon, kiun ĉirkaŭkadrus brungrizaj kurtenoj harmonie kontrastaj kun la bluaj.

Jen subite intermiksitis sin kun la zuma babilado la majestaj tonoj de orgeno, dum sin lokis sur la estrado multaj bone konataj personoj: generalo Bastien, s-roj Kürsteiner, Malmgren, Jakob, Goldsmith, s-ino Wanda Zamenhof, — kaj aliaj, kaj aliaj.

Silentiĝis la orgeno. Stariĝis s-ro Bastien antaŭ la mikrofonoj, meze de longa blankvestita tablo, beligita per vazoj kun freŝaj, multkoloraj floroj. Post deklaro, ke la Kongreso estas malfermita, li prezentis D-ron E. von Steiger, konsilanton de la Svisa Federacio, kiu bonvenigis la samideanojn en la nomo de la Svisa Federacia Konsilantaro kaj de la Registaro de Kantono Bern. Li parolis unue germanlingve kaj poste france, kaj Esperantan tradukon legis s-ro Otto Walder, ĉefdelegito de UEA por Svislando.

« Zamenhof estis saĝa kaj profunda pensanto, » diris D-ro von Steiger, « kiu komprenis ke ne sufiĉas, ke ĉiu lando sekvu la propran politikon, sed ke necesas internacia komprenado kaj toleremo universala... Esperanto estas la plej vaste parolata el lingvoj artefaritaj... Estas elokventeco en lingvo, kiu prezentas facile kaj oportune la homajn pensojn kiajn ajn; ĝi estas la elokventeco de la mondo. Esperanto atingu tiun elokventecon de la mondo. »



(Foto: Carl Jost, Bern.)

Sub la sankta signo de l' Espero

La grandega Verda Standardo de la Kongreso (ĉ. 5 x 7 m.), kiu preskaŭ kaŝis al la rigardantoj el la galerio la oficialajn personojn kaj delegitojn sur la estrado. Intertempe tiu standardo jam transmigris al Malmö, la urbo de la venonta Kongreso.

S-ro Bastien respondis per saluto al la lando kaj urbo de la Kongreso. « Por esperantistoj Svisujo estas ne nur turisma lando, sed lando de paco, kiu restis ekster la milito. » Li dankis s-ron Buchli kaj kunlaborantojn en la Loka Komitato pro ilia sukceso kontraŭ grandaj malfacilaĵoj. Li esprimis ĝojon pri la ĉeesto de s-ino Wanda Zamenhof (granda aplaŭdo), la bofilino de la majstro kiu, krom sia filo Ludoviko, estas la sola transvivinto de la Zamenhofa familio, tiom persekutita de la germanaj naziistoj. La lastaj ok jaroj dolorige trafis la Esperanto-movadon, ĉar la diktatoroj, kiuj volis perforti la mondon, ne indulgis nian movadon, kies celoj estis kontraŭaj al la iliaj. Granda estas la nombro de pereintaj esperantistoj. Post aludo al diversaj demandoj, kiuj interesas la Esperanto-movadon, li finis per la vortoj: « Paco per toleremo! Jen nia devo! »

Dum la orgeno denove sonis, estis la vico de la ĉeestantaro paroli (inter si). Ili aspektis kiel nura ordinara homamaso; nenia fanatikeco, nenia ekscentrikeco tie montriĝis. Iliaj vestoj aspektis kvazaŭ tiaj de unu sola nacio. Tamen — rigardu apud la dekstran pordon tie: tri ĉarmaj fraŭlinoj dolĉe ridetas. Ekscentrikaj? Tute ne! Belegaj? Jes, ja! Ili surhavas kostumojn el multkolora flora ŝtofo, randitajn de blanka punto, kun mezlongaj blankaj manikoj elstarantaj ĉe la ŝultroj, kaj kapornamaĵojn el floroj kaj juveloj, — naciajn kostumojn de Ĉeĥoslovakujo.

Post silentiĝo de la orgeno parolis trafikdirektoro Hans Buchli, kiun oni elektis la kongrespredikanto: La mondo spertis kulturen kaj ekonomian bankroton, el kiu ni devas elkonduki ĝin. Ni estas kvazaŭ miniatura ligo de nacioj. Kvankam mankas al ni la potenco de UNO, tamen ni posedas avan-

tagon: la unuecan spiriton kiu nin animas, la idealon kiu nin unuigas, kaj la lingvon kiu nin interligas kaj kiu detruas la barojn inter ni. Mi esperas ke la granduloj de la mondo iutage konvinkiĝos pri la valoro kaj graveco ĝuste de tio lasta. Ĉar efektiva interkompreno estas ebla nur, kiam la interŝanĝado de ideoj ne malhelpas lingvaj baroj. Ni devas trovi novan humanismon, kiu ne estas idilo sed forta konscio pri nia reciproka interligiteco. Oni devas konstati ke ne vi kaj mi staras en la centro, sed ni.

Sekvis oficialaj salutoj de landaj registaroj aŭ ministerioj: D-ro Glüxmann, Aŭstrujo; s-ro Bartošik, Ĉeĥoslovakujo — dume la tri ĉeĥoslovakianoj stariĝis antaŭ la estrado; ing. Isbrucker, Nederlando; kapitano Bugge-Poulsen, Norvegujo; kaj D-ro Söderberg, Svedujo, kiu sciigis, ke la ŝtato okazigas du Esperanto-kursojn por instruistoj kaj bone subtenas la lingvon. « Jam nun — bonvenon al la 33-a en Malmö! »

S-ro Geryk, la fame konata samideano kaj volonisto, faris personan saluton de D-ro Beneš, Prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Dum la salutoj de la landaj asocioj, kiuj sekvis, oni povis distingi multajn naciajn dirmanierojn; tamen ĉiu vorto estis klare komprenebla, kaj multaj el la parolantoj eĉ ne havis nacian trajton en sia voĉtono. Oni salutis nome de la landasocioj argentina, aŭstra, belga, brita, bulgara, ĉeĥoslovaka, dana, greka, franca, hungara, irlanda, islanda, itala, jugoslava, maroka, nederlanda, norvega, palestina, pola, sveda, usona kaj svisa. La greka salutanto sciigis, ke la Ministerio de Instruado rekomendas Esperanton; ke oni ĝin instruas en dek gimnazioj, kaj ke estas ĉ. 1700 novaj esperantistoj en Grekujo.

Kiam la orgeno sin aŭdigis la trian fojon, ĝi eligis la konatan melodion « La Espero »; ĉiuj kongresanoj ekstaris kaj kunkantis.

Anĝela lingvo.

Alia orgeno, orumita kaj kun du fasadoj el blankbrilaj stanaj tuboj, muzikis por la esperantistoj je la dimanĉa posttagmezo, kiam ili amasiĝis en la bela Berna Katedralo por Diservo. Dum ili eniris (parenteze, oni povis rimarki multe pli da naciaj kostumoj ĉi tie), aliaj homoj el blanke-griza ŝtono estis suprenirantaj laŭ la arko de la enirejo al la ĉielo, dum unufanke staris rigardante la ses ĉastaj virgulinoj, kaj aliflanke la ses malĉastaj. La interno estis el la sama blanke-griza ŝtono; sed supre, ĉe la volboj, ĝin kontrastis kolorigitaj desegnoj.

Por sia prediko, pastro Ed. Waldvogel, maldika sinjoro kun nigraj haroj, lipharo kaj mantelo, elektis la temon: « Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbal. » (I. Kor. 13.)

Unue li traktis la valoron de lingvo: Prefere kvin vortoj el la intelekto ol kvincent de senencaĵo. Poste li aludis al Svisujo kun ĝiaj kvar lingvoj, kaj al Esperanto, « la plej anĝela lingvo ». Tamen, krom Esperanto, oni bezonas amon. Esperanto sola ne garantias la pacon. Estas nacioj, kiuj havas nur unu lingvon, kiuj malpli pace vivas ol landoj kiuj havas du, tri aŭ pli multajn lingvojn. Plej gravas la Dia leĝo. Amu unue Dion; due la proksimumon; kaj vin mem nur trie! Amu unu la alian! Ankaŭ esperantistoj tion faru.

La monokolekto estis por nutraĵpaketoj al eksterlandanoj malsatantaj (596 frankoj).

Sendisciplina armeo.

La tre malunuforme vestita armeo da pacaj batalantoj, elirinte el la katedralo, tramarsiĝis (sur la trotuaro) la stratojn de Bern al loko sub la bela Kirkenfeld-ponto, por fotografi. Ili marŝis senritme, sen formacio — krom longega kolono —, kaj senpermeso ili deiris de la kolono por suĉi la tentan akvon ĉe stratfonto.

La suno glorie baptis ilin per siaj varmegaj radioj, kaj multaj kriplendis, ĉar ili devis sidi dum du tri minutoj por la fotografiado en la kvazaŭ infera varmege.

Tamen « la longegaj minutoj finfine finiĝis », kaj la amaso iom post iom babilante disigis. La plendintoj iris por ĉi unu la alian! Ankaŭ necesas varmegan tetrinkadon.

Pli ol 150 salutleteroj impresis

kiujn direktis anoj de Universala Ligo al la Generala Kunveno de 7-an de julio en Londono. Parolis tie niaj gesamideanoj s-ino Isbrucker, Andreo Cseh kaj E. D. Durrant. La «Kampanjo por Mondregistaro» jam konsentis uzi Esperanton inter aliaj lingvoj por korespondado, kaj esperantistoj estas invititaj en du el la ĉefaj komitatoj. La Kampanjo por Mondregistaro celas kunligi la agadon de diversaj federalistaj kaj similaj organizaĵoj en Britujo. La Kampanjo esperas presigi esperantlingvan informilon post iom da tempo, kaj tiam sendos ekzemplerojn al la salutintoj.

Unueco kaj dueco.

Unueco karakterizis la unuan parton de la *Unua Laborkunsido*, kiam per anonco de la nove elektitaj estraranoj de UEA (nova) oni solenis la kunfandiĝon de la du neŭtralaj asocioj. Jen la nomoj: E. Malmgren (Svedujo), Prezidanto; D-ro P. Kempe-neers (Belgujo), Vicprezidanto; Estraranoj: s-roj Jakob (Svisujo); Kennedy (Skotlando); D-ro Lapenna (Jugoslavujo); Oliver (Anglujo) kaj Petit (Francujo).

S-ro Malmgren esprimis dankon pro sia elektigo kaj bedaŭron pro la eksigoj de s-roj Bastien kaj Kürsteiner, la ĝisnunaj prezidantoj de IEL kaj UEA respektive, kiuj tamen restas kiel Honoraj Prezidantoj. Sekvis personaj salutoj de diversaj special-kaj fak-organizaĵoj. S-ro Makkink (Nederlando), por la Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E., esprimis la bezonon de kunlaboro inter ĉiuj esperantistoj — ĉu laboristaj, ĉu neŭtralaj. S-ro Holmes (Britujo) salutis por la spiritistoj kaj speciale por la brazilaj esperantistaj spiritistoj. Sekvis: s-ro Frey, Aŭstrujo (P.T.T.); s-ro Berman, Palestino; f-ino M. Noll (Turisma Unuiĝo por Danujo); s-ro P. Filliâtre, Francujo (ILEPTT); s-ro Ager, Anglujo (kooperativa movado); s-ro Išna, Ĉeĥoslovakujo (blinduloj); reprezentanto de TJO.

S-ro Goldsmith, ĝen. sekretario de la nova UEA, legis salutleterojn aŭ telegramojn de L. Zamenhof, Edmond Privat, Teo Jung, Paul Blaise, Egipta Esp. Asocio, V. M. Thilander, Berlinaj kaj ĉinaj esperantistoj, biblioteko en Singaporo, studrondo en Bangkok (Siam) kaj multaj aliaj. La bahaistoj sendis telegramojn el diversaj lokoj.

S-ro Malmgren priparolis la kunfandiĝon. Du kontraŭaj ideoj malhelpis, sed en la pasinta printempo la komitato akceptis principe la kunfandiĝon. Oni dissendis voĉdonilojn al la landaj asocioj de IEL kaj al

sismo, kaj prezentigis la orienta kaj la okcidenta sintenoj al tiuj temoj.

Enkondukis la temon D-ro Lapenna, kiam li diris ke la balkanaj asocioj ne akceptis la parton de la statuto pri elekto de la komitato, ĉar laŭ ili ĝi ne estas demokratika. Tamen la malplimulto devis cedi al la plimulto. Li emfazis ke la statuto ja gravas. Ĝi estas nia regularo, kiu fiksis nian konsiston. Esperanto estas ne nur por postmark-kolektado (aplaŭdo) sed grava afero. La komitato, la estraro estu elektataj kiel eble plej laŭ la demokratiaj principoj. Oni devas malpermesi al faŝistoj la aliĝon. Ni ne sufiĉe kontraŭstaras la faŝismon kaj duonfaŝismon.

Sekvis diversaj opinioj. S-ro Sayers el Usono, kiu dum kelke da jaroj laboras kun la Kontrola Komisiono por Germanujo, komparis la eŭropan koncepton pri demokrateco kun la amerika — originale de Britujo. Iuj eŭropaj landoj multe parolas pri demokrateco, sed ili tute ne komprenas kio ĝi estas. Demokrateco estigas ne per malpermesoj aŭ diktatorado de la supro, sed kiam la voĉo de la popolo sin aŭdigas. Oni devas havi liberecon pri parolado. La popolo devas povi forigi nedeziratan publikan oficiston. (Fervora aplaŭdo.)

S-ro Oliver demandis, ĉu la enkonduko de kontraŭfaŝisma frazo en la statuton ne estus diktatoro. Li citis la vortojn de Zamenhof pri tolereco. Politikon devas trakti la diplomatoj; UEA restu oficiale neŭtrala, sed ĉiu povas esprimi sian privatan opinion.

Estas neeble ĉi tie citi detale ĉion, kion diris multaj aliaj.

Tra la urbo kaj semajno.

Dum la tuta semajno ora disko konstante ornamis la bluan volbon de la ĉielo, kaj estis tiel varmege ke la samideanoj re-nomis la landon «Ŝvitlando». Plurfoje oni vidis ŝelkojn antaŭ la mikrofonoj ĉe la kunsidoj, — ĉar eĉ la malpli junaj viroj delasis la jakojn, dum kelkaj junaj montris siajn negraciajn krurojn, surhavantante pantaloneton.

Ĉe la Solena Malfermo oni sciigis ke en Svislando ĉiuj infanoj devas lerni almenaŭ du lingvojn; sed anĝla samideano rimarkis ke multaj kelnerinoj fakte scias nur unu: la svis-germanan. Multaj el ili tute ne sciis la anglan, kaj kelkaj sciis nenion pri la franca krom la vortoj: «*Merci, monsieur!*» Aliaj ne sciis la francan tiom kiom li mem, sed uzis ĝin nur kiel balbutlingvon. Prezojn oni skribis aŭ indikis per la fingroj, kaj jes neante per la kapo oni sukcesis iamaniere internacilingvumi.

Ĉu esperantistoj devas ĉiam paroli Esperante inter si, estas diskutinde. En trampo palestina paro sidis parolante la hebrea. Apud ili tri francoj parolis france, dum aliaj uzis la anglan, ĉefan kaj aliajn lingvojn. Subite iu diris ion Esperante, kaj ĉiuj ekridis. Dank' al la naciaj lingvoj la Bernanoj tie konstatis ke la samideanoj estas diversnaciaj — kaj ke Esperanto estas viva, spontanea lingvo, ili ankaŭ konstatis, ne balbutilo kiel la svisaj kromlingvoj.

Preterpasante la Bernanojn en la strato, oni ofte aŭdis la vortojn *Esperanto, Esperantistes, Esperantisten*. La kongreso certe sin preparoligis.

Plej rimarkinda en Bern estas la eksterordinara pureco. Fontoj, horloĝoj kaj monumentoj en la stratoj estas orumitaj, kaj ili restas brilaj tra la jaroj. En aliaj urboj, kiel nigraj ili aspektas post du semajnoj! Skarlataj pelargonioj (geranioj) ornamas preskaŭ ĉiun fenestron de la kremkoloraj konstruaĵoj. Malpala verdo de aro post aro da arboj sin vidigas apud la rivero, kies akvo mem estas profunde verda, rompita nur jen kaj jen de la ruĝe-flavaj graciaj formoj de naĝantaj homoj.

La amasrestejo en la kazerno estis vere hejmo de Esperanto, kie malfru-vespere troviĝis rondoj familiaj de francoj, poloj, angloj, hungaroj k.a., ĉiuj kune, sidantaj sur siaj litoj, fumantaj kaj babilantaj pri la okazoj de la tago ... kaj de la vespero. Supozeble okazis simile ankaŭ en la ina parto.

Paroladoj.

Béla Bleier, Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Reto Roseti kaj Isaj Dratwer! Jen la parolantoj ĉe la *Prelegvespero* lunde vespere.

«Nia movado estas esence kultura,» diris Béla Bleier. «Esperanto estas ne nur lingvo de babilado, sed esprimorika. Militistoj povas invadi, sed ili ne povas detrui la spiriton.»

Julio Baghy per sia unike modulanta voĉo unue rakontis al ni ŝercan anekdoton pri «kampa rano». Sed pli filozofie li poste parolis. «La esperantistaro estas nova popolo. Pratempe popoloj estiĝis el triboj, poste el tiuj kiuj parolis saman lingvon. Do la esperantistoj estas popolo. Tamen lingvoprojekto ne kreas popolon. Popolo devas havi karakterizan trajton. Ĉiuj esperantistoj havas tiun econ kiu distingas ilin de aliaj homoj. Ekzistas la okcidenta kaj orienta demokrateco; tamen Esperanto havas politikon ... Hundoj naskiĝas hundoj; katoj — katidoj; ĉevaloj — ĉevalidoj; sed kie estas la homidoj? Homoj naskiĝas judoj, proletoj, katolikoj, socialistoj ktp. ... Ni esperantistoj estas nur homoj; ni laboru por la nova epoko.»

K. Kalocsay parolis pri la tradukado de poemoj en Esperanton. La teknikon de la novzelandia samideano Brendon Clark li forte kontraŭstaris — kaj misprezentis. Brendon Clark devus esti ne leĝdonanto, sed leĝtrovanto, ĉar la Esperanta poezio jam ekzistas. Estus malaprobinde trokeigi la Esperantajn versojn, ĉar trokeo estas trankvila ritmo, dum jambo estas vigla. La jambo ja ekzistas en Esperanto. Pilongigi

versojn per aldona piedo (kiel rekomendas Brendon Clark) estas nepraktikeble. Tamen li povas pardoni s-ron Clark, ĉar li tradukas el la angla lingvo — malfacila tasko.

Poezio bezonas ankaŭ la ĝustajn sonojn, do neologismojn, — ĉar poemo estas poemo. Klarige li finis per elokventa, esprimoplena deklamado de poemo tradukita el la hungara lingvo, en kiu oni elektis vortojn pro iliaj sonoj. Li petis ke tion, kion oni ne komprenas, oni divenu.

Grandioze sonis tiu poemo, kaj li ricevis fortegan aplaŭdodon. Konante la originalon en la hungara lingvo, komprenable li povis enmeti sian tutan animon en la deklamadon. Ĉu surpapere, aŭ deklamate de nehungaro, ĝi estus tiel grandioza?

Jam forpasis la vespero, kiam Reto Roseti ekdeklamis poemon de la skota poeto Bobby Burns, kaj multaj el la ĉeestantoj ekforiris. La tuta programo ŝajne estis okuponta ne nur prelegvesperon sed ankaŭ prelegnokton.

Kurioza horloĝo kaj kurioza glacio.

La belega vetero tentis multajn samideanojn partopreni la *ekskursojn*. Unu francino plendis ke ĉe la rondveturo tra la urbo la gvidanto parolis nur angle, kaj ŝi ne komprenis eĉ unu vorton. Tamen ĉe aliaj ekskursoj samideano kutime laŭtvoĉe tradukis.

Du neesperantistaj sudamerikanoj sin intermiksas en iun rondveturon, kaj ili komprenis nek anglan nek germanan nek Esperantan lingvojn. Ili tamen povis diveni multon el la Esperanta traduko, sed ne ĉion; kaj kiam ili faris hispanlingve demandon, la tradukanto provis respondi hispane kaj poste itale, sed ne sukcesis. Inter la ĉirkaŭaj esperantistoj tamen, komprenable, troviĝis iu italarolanto, kaj la malfacilaĵoj oni venkis. Dank' al la esperantistoj ankaŭ tiuj du hispanlingvuloj komprenis ĉion diratan pri la rondveturo. Samtempe iu hungara samideano tradukis en sian lingvon por aliaj hungaroj, kiuj ne sciis anglolingvon aŭ Esperanton.

Kvar brunaj statuoj reprezentaj de la kvar lingvoj de Svisujo — germana, franca, itala kaj romanĉa — sin trovis en la granda enirhalo de la Parlaŭtejo. Tie ankaŭ estis skulptita figuro de urso, laŭ kiu la urbo nomiĝas (Bär = urso). Iu reĝo konstruis kastelon tie kaj nomis ĝin laŭ la unua besto kiun li poste mortparfis. Felice tiu estis urso, ne porko!

Vivantajn ursojn oni poste vidis en la ursejo. Ili staris sur la malantaŭaj piedoj aŭ rulis sin sur la dorso, por peti karo-tojn de la ĉeestantoj.

Je kelkaj minutoj antaŭ la dek-dua la rondveturantoj amasiĝas antaŭ la granda horloĝo por vidi ĝin funkcii. Koko movas la flugilojn kaj krias. Sidanta viro svingas la kruron kaj per la manoj frapas alterne du sonorilinojn. Venas la horo, kaj la Reĝo de la Tempo, sidanta sur sia trono, turnas horglason. Supre de la turo, orumita figuro de viro frapas per martelego la grandan sonorilon. Leono skuas la kapon samritme, kaj la reĝo movadas sian mentonon, dum sub li rondiras karuselo da ursoj. Fine la koko denove krias.

El la urbo sur la belajn montojn kondukis aliaj ekskursoj. Oni povis vidi malsupre la multkoloran panoramon, kvazaŭ filikitan litkovrilon. Verdverdaj herbokampoj, orecaj grenkampoj, ombre-verdaj arbaroj kaj argente-blankaj lagoj apudis en fantazia desegno, nuancata de la ombroj de du tri nuboj kaj de la pala purpuro de malproksimeco. La horizonton gardis la Alpoj — neĝoĉapitaj sentineloj majeste starantaj. Iliaj supraj lomete varilgis la koloron, kiu jen estis limona, jen palrozeca, jen blanka, — tiel blanka ke eĉ Esperantaj vortoj ne kapablas priskribi tian blankecon.

Plej favorata estis la ekskurso al *Jungfraujoch*, 3457 metrojn super la marnivelo, kien oni alvenas per fervojo kiu finiĝas en tunelo en la montosupro. Koridoro kondukas tra la glacio al ĉambroj fositaj el la eterna neĝo. Jen el glacio aŭtomobilo, en kiu oni povas sidi por fotografi. Jen tie ĉambro de biertrinkejo, kun barelo, tabloj, seĝoj, piano k.c. el solida glacio. Ekstere sur la neĝa supro, kie estis malvarmege, oni povis vidi vicon post vico da Alpoj, sed apud la konstruaĵo, ŝirmata kontraŭ la vento, estis tiel varme ke oni povis sunbani.

Post la ferio...

«Post la ferio kun nova energio al la laboro!»

Nia redaktoro bedaŭrinde ne povis vojaĝi al la Universala Kongreso en Bern. Anstataŭe li libertempis dum ok tagoj en vilaĝo ĉearbara. Reveninte, li trovis sur sia skribotablo ĉ. 200 poŝtaĵojn, kiuj alvenis dum la libertempa semajno, inter ili estis 71 leteroj kaj 103 poŝtkartoj. La plej urgajn ni jam respondis.

Nur 400 abonantoj

(al ili koran dankon!) sendis al ni ĝis la 1-a de septembro karton aŭ scilgon pri sia reabono, laŭ nia peto «por ke poste vi ne plendu» (vidu en numero 13, paĝo 1, dekstre malsupre). Kie restas la ceteraj 1340? Ni ja ne povas laŭorde disponi, ne sciante proksimume kiom el niaj nunaj abonantoj restos al ni fidelaj ankaŭ dum la venonta periodo. Pri la

membroj de Universala Ligo

ankoraŭ la jenon: Membroj de UL, kiuj ricevas Heroldon komence por «La Praktiko», provizore ne skribu al ni: ilia abono validos ĝis la fino de la nuna jaro. Sed tiuj membroj de UL, kiuj speciale abonis

Diverseco ĉe la Dua.

«La Propagando» estiĝis la temo de la *Dua Laborkunsido*, kaj kvan-kam s-ro Malmgren en sia enkonduka parolado alvokis, ke oni agu kune per metodo kiun oni povas uzi en diversaj landoj, tamen sekvis diversaj opinioj pri diversaj cirkonstancoj al diversaj homoj en diversaj nacioj.

Ĉi tion aprobis alia svedo, s-ro Dahl, dirante ke propagandiloj similas pomojn en korbo. «Ili havas diversajn kolorojn, kaj oni devas elekti la plej taŭgajn. La ĝisnunaj metodoj ne sufiĉas; ni devas esti pli praktikaj.» Li poste aludis al «Esperanto en la lernejoj». Oni vekis la interesecon de la instruistoj kiuj subskribis la Petskribon. Plugu profunde unu kampon, poste alian.

Sugestiĝis pli intima kunlaboro inter UEA kaj SAT, sed s-ro Petit volis proponi kunfandiĝon de tiuj du asocioj.

Interesa propono venis de D-ro J. Székely (Hungarujo). Li proponis ke UEA alproprigu la varnomon ESPERANTO kaj permesu ĝian uzon nur ĉe bonaj varoj. Tiel ia vorto «Esperanto» alproprigus al si la ideon de bonkvalito. Li ankaŭ rimarkigis ke «Esperanto-strato» estas pli bona por propagando ol «Zamenhof-strato».

S-ro Goldsmith diris ke la plej granda propagando dum la lastaj jaroj estas la *Petskribo al UNO*. La nombro de subskribintoj estas ĉ. 300.000; sed tio ne sufiĉas.

S-ro Magnusson (Islando) volis ke oni faru la propagandon kvazaŭ militplanon.

Forpasegis la tempo, kaj oni limigis la paroladurton je po tri minutoj. Unu post alia parolantoj kuris laŭvice al la mikrofonoj.

S-ro Makkink (Nederlando) rekomendis ke oni propagandu modeste kaj ne polemiku.

D-ro Lapenna komparis Esperanton kun telefono: ju pli multe da uzantoj, des pli efika ĝi estas.

Ktp. ktp.

«Vi povas kalkuli kun nia registaro!»

Ĝojigas la esperantistojn koron aŭdi tiajn vortojn kiajn parolis kalkulkonsilisto R. M. Frey, kiel komisiito por eksterordaj aferoj de Aŭstria Esperantista Federacio, en Bern: «Se la aliaj ŝtatoj faros rilate al Esperanto gravajn paŝojn, ili povos kalkuli kun nia ŝtato, kun nia registaro, kun nia parlamento kaj kun ĉiuj niaj eminentaj instancoj!»

Jes, nur komuna oficiala enkonduko de Esperanto en komence almenaŭ du-tri diverslingvaj ŝtatoj alportos al ni baldaŭ la venkon.

Alia internacia lingvo.

Folietoj, disdonitaj de iu bonvola samideano ĉe la enirejo de la Kazono mardon vespere, tre oportune utiligis kiel ventumiloj, kiam amasa ĉeestantaro plenigis la halon por aŭskulti alian internacian lingvon — pli malnovan kaj pli vaste konatan ol Esperanto.

Sur la estrado ne plu vidiĝis la longaj tabloj kaj seĝoj, sed anstataŭe unu sola seĝo, sendorsa, antaŭ kvazaŭ tripieda granda tablo — la «vortaro» de ĉi tiu lingvo.

Post enkonduka parolo en Esperanto, envenis la du unuaj «parolantoj»: unu, altkreska, blankhara kaj iom kalva, en nigra vesperkompleto, s-ro Frank Merrick el Anglujo, post kliniĝo sidiĝis ĉe la tripieda «vortaro»; la alia, mezalta, pli juna, ankaŭ en nigra vesperkompleto, s-ro Jan Geryk el Ĉeĥoslovakujo, portis en la mano malgrandan sed multnuncan «terminaron», la violonon.

Kiam la forta aplaŭdo silentiĝis, kvietaj, trankvilaj sonoj de la piano ŝteligis solaj tra la ĉambro. Jen pli rapidaj! Jen eks-citaj!

Sin trudis modeste per longa sopira noto la violono. Gracie kaj eterece ĝi ŝtelpaŝis



(Foto: Carl Jost, Bern.)

Blanka kaj Nigra en Bern.

Ili povas ja esti kontentaj, niaj ĉarmaj samideanoj el Ĉeĥoslovakio kaj el la Nigra Kontinento, ĉar dank' al Esperanto ili sentas sin anoj de la sama granda tut-homara familio.

la delegitoj de UEA. La rezulto estis ke ĉ. 10.000 voĉdonis por la statuto, ĉ. 2000 kontraŭ ĝi, kaj ne voĉdonis ĉ. 2000. Oni akceptis kiel bazon la statuton de IEL kun diversaj ŝanĝoj. Hieraŭ vespere (la 27-an de julio, ĉe la kunsido de la UEA-komitato) oni alektis al la komitato (komitatanojn C): s-rojn Ball (Britujo), Privat (Svisujo), Sayers (Usono) kaj Baghy (Hungarujo). S-ro Jakob estas redaktoro de la asocia organo. La nomo de la nova asocio estas Universala Esperanto-Asocio. (Aplaŭdo). «Ne grava estas nomo aŭ paragrafo, sed unueco.» (Aplaŭdo.)

S-ro Jakob venis al la mikrofonoj kaj parolis pri la historio de la organizado de la movado. Li manpremis s-ron Bastien kaj poste s-ron Kürsteiner.

Poste la mikrofonojn oni disponigis al ĉiu ajn kiu volis paroli, kaj sekvis diversaj paroladetoj. S-ro Dratwer alvokis ke oni laboru kune, ĉu laboristoj, ĉu neŭtraluloj. S-ro Vokal, la Esperanto-parolanto ĉe Radio-Vieno, esprimis la deziron ke venu solidareco. S-ino Ita Wittenberg, rusa judino, dufoje rifugiĝinta, kiu nun loĝas en Svisujo, prave opiniis ke mankas virinoj en la oficaĵ rangoj de la Esperanto-movado.

Dueco sin trudis en la lastan parton de la laborkunsido, kiam la temo sin turnis al demokrateco kaj fa-

La venonta numero de Heroldo

aperos la 15-an de oktobro, kaj poste ni intencas rekomenci la duonmonatan aperigadon.

tra la nuancoj de la gamo. Parolis denove la piano; jen ĝi tondris per la basaj notoj, kies sonoj ruliris eĥante tra la spaco de la halo.

Silenta paŭzo. La violono sola nun eligis mordantajn sed bele agorditajn du-notaĵojn. Respondis la piano, kaj per laŭtaj plensonaj akordoj finiĝis la unua ero de la programo, sekvata de la tondro de miloj da manoj aplaŭdantaj.

Gounod, Grieg, Dvorak, Chopin, Bach, Puccini kaj aliaj bone konataj nomoj trovigis sur la programo.

«Lingvo de anĝeloj!» diris la pastro dimanĉe, sed eĉ pli anĝele sonis Esperanto, kiam per la dolĉa soprana voĉo de s-ino *Marguerite Sautreuil* el Francujo ĝi sin vestis en la delikatan silkon de la muziko.

Ŝi surhavis nigran ĝispiedan vesperrobon, kiun ornamis ĉe la talio siringkolora floro. Krom kanti en Esperanto, ŝi ankaŭ ĉarmis niajn orelojn per la de ĉiu ŝatata ario el la opero «*Butterfly*» de Puccini.

Ĉiuj tri estas profesiaj muzikistoj kaj ofte aŭdiĝas ĉe la radio en siaj landoj. De antaŭ multaj jaroj ili estas fervoraj geesperantistoj.

Fakkunsidoj.

Okazis tiom da *fakkunsidoj*, ke eĉ listigi ilin ĉi tie okupus multe da spaco. Detalajn raportojn oni povas havigi en la respektivaj bultenoj de la asocioj, kaj kompreneble tiuj organizaĵoj bonvenigos vian aliĝon.

Okazis ankaŭ kvin *filmprezentoj*: ĉe la Pola Vespero, marde en la kinejo Tivoli (du filmoj «*Suite de Varsovie*» kaj «*Wieliczka*», ambaŭ premiitaj ĉe la Internacia Filmkonkurso en Cannes); ĉe la kunveno de Universala Ligo, merkrede ptm.; en la kinejo Capitol, vendrede atm. («*Parizo* okupata, Parizo sin liberigas, kaj Parizo invitanta la Internacian Konferencon 1947»); la nova sonfilmo «*Budapest, la Reĝino de la Danubo*», en kiu parolas la voĉo de Julio Baghy; kaj vendrede atm. en Capitol filmo pri Svedujo, la lando de la venonta U.K.

Ne tre multnombre ĉeestataj estis la fakkunsidoj, pri kio oni kulpigis la belan veteron kaj ekskursojn. Aliaj tamen kulpigis la fakton ke ili ne sufiĉe frue eksciis la datojn kaj horojn de la fakkunsidoj kaj jam estis planintaj aliajn farojn por tiuj tempoj.

lom da ĉio — kaj multe da rido.

Surpriza estis la *Varieteo*, merkrede vespere, ĉar oni tute forlasis la presitan programon kaj improviziis novan dumprezente.

Blonda sinjorino *Klara Géczy Lazaras* komencis per tri muzikpecoj ĉe la piano: «*Le Soir Parle*» kaj «*Allegro Barbaro*» de Bartock, kaj «*Hungara Rapsodio N-ro 2*» de Liszt. De antaŭ 25 jaroj ŝi ludas ĉe la Hungara Radio, ankaŭ ĉe Radio Romo, kaj dum la kongressemaĵino ŝi ludis ĉe la Berna Radio. Kiam ŝi dediĉis unu el siaj komponaĵoj al la Reĝino de Nederlando, la Reĝino sendis al ŝi gratulan dankleteron; kiam ŝi finis sian ludadon ĉe la Kongresa Varieteo, oni donacis al ŝi belan bukedon.

Julio Baghy rolis kiel programestro kaj anoncisto kaj samtempe ridigis la samideanojn per amuzaj anekdotoj.

Reto Roseti (Anglujo) ankaŭ ridigis per aliaj anekdotoj, kaj *Einar Dahl* (Svedujo) amuzis pri serioze per kantado. Li estas baritono, kvankam li modeste ne volis arogi al si tiun titolon.

Sekvis *Kolomano Kalocsay* kun aliaj anekdotoj, inter kiuj unu pri la embaraso de la redaktoro de «*Literatura Mondo*». Li konsilis ke ĉiu esperantisto verku poemon, sed *neniu legu* poemon — krom sia propra.

Mistifikis nin per lerteco *Vilĉjo Verda* («*kaj sej vi neĵ poŭvahs divejni, dej kiu landoŭ li vejnahs, li neĵ intencahs informi vin*» — per tia aliĝo de sia nature bona Esperanta voĉo li nin informis). Lertajn iluziojn li intermiksas per ŝerca Esperanto-lectiono. Helpis lin lia edzino.

Gracia kaj ĉarma aspektis *Dorothy Géczy*, la filino de s-ino Géczy Lazaras, en Hungara Danco kaj bela mallonga baletvesto kun blanka elstara juvo randita de blua kaj ruĝa strioj. Ruĝa veŝto ĉirkaŭkaresis ŝian talion, kaj de ŝiaj profunde brunaj haroj pendis rubandoj diverskoloraj.

Je la fino de la Varieteo la aspekto de la gesamideanoj pli ol je iu alia tempo dum la semajno konformis al tiu stranga koncepto, kiun ofte kaj ial havas pri ili la ne-esperantistoj. Frenezaj kuriozuloj, ili frapis la plankon per la piedoj, svingis la manojn en la aero, kaj fine eligis fortegan «*Hura!*».

La SAT-Kongreso en Aarhus

fariĝis granda sukceso. Ĉio estis bone organizita, kaj la vetero, escepte de unu-hora pluvo ĉe la ekskurso al la «*Ĉiela Monto*», estis belega. Interkonatiĝo, solena malfermo, oficiala lunĉo partoprenita de 700 personoj, laborkunsidoj, ekskursoj, balo, — certe ne ekzistis enuo dum la kongresa semajno. Ĉiutage aperis ilustritaj artikoloj pri la kongreso en ĵurnalo «*Democraten*». Oni bedaŭris la neĉeeston de germanaj kamaradoj, al kiuj la dana registaro rifuzis la vizon. La venonta SAT-Kongreso okazos 1948 en Amsterdam, kaj la postvenonta 1949 verŝajne en Karlovy Vary, la mond fama ĉeĥoslovaka banurbo.

La kulpulo estis, kompreneble, Julio Baghy, kiu komencis per anekdoto pri hungaroj kaj drinkejo kaj finis kiel memfarita generalo komandante kaj ekzercante du esperantistajn armeojn — sidantaj.

Pacaj batalantoj.

Vigla diskutado kolorigis la *Trian Laborkunsidon*, kiam denove antaŭiĝis la demando pri la sinteno de UEA rilate al faŝismo.

Reprezentantoj el sep landoj prezentis al la kunsido rezolucion esprimantan definitive ke la Kongreso estas kontraŭfaŝista.

Ĉefrolis kiel parolantoj por la rezolucio D-ro *Lapenna*, kaj ankaŭ delegitoj el Palestino.

La rezolucio estis malakceptata per voĉdonado, kies rezulto estis: pore 40; kontraŭe 126; ne voĉdonis 34.

La kunsido ankaŭ akceptis proponon ke ĉe la venonta 33-a Univa Kongreso en Malmö oni disponigu kelkmil svedajn kronojn por vojaĝigi parolantojn por la fakkunsidoj, por ke ili estu pli bone ĉeestataj.

Dum la kantado de «*La Espero*» je la fino de la kunsido du vortoj kontraste elstaris. La proponintoj de la kontraŭfaŝisma rezolucio laŭtvoĉe emfazis: «*Pacaj batalantoj*».

Malgraŭ la diferenco de opinioj, ĉiuj tamen foriris kviete kiel pacaj kaj amikaj batalintoj.

Lingvo de Piedoj.

Sajne ĉiuj kongresanoj ĉeestis la balon jaŭde vespere, ĉar ne nur la granda halo estis plena, sed ankaŭ la flankĉambroj, kaj ankoraŭ aliaj homoj troviĝis sur la balkonoj kaj en la balustrejo ĉe la supro de la du larĝaj marmoraj ŝtuparoj. Povis tamen esti ke ilian nombron suplementis amikoj, kiuj rajtis eniri po unu kun samideano kaj 5 frankoj.

La pargeton kovris ne vicoj da seĝoj kiel ĉe la aliaj kunvenoj, sed densa aro da homparoj. Blanke kovritaj tabloj kun seĝoj staris ĉirkaŭe apud la muroj kaj en la flankĉambroj, kaj tie sidis la nedanculoj kaj dancintoj por ĝui malvarmajn trinkaĵojn, babiladon kaj ripozon.

Eĉ pli da naciaj kostumoj vidiĝis tie intermiksita inter ordinaraĵ tagkostumoj kaj vespervestoj.

Bela kaj varmega estis la vespero, sed larĝe malfermitaj staris la fenestropordoj, invitante sur la balkonon en la malluman, pli malvarmetan eksteran aeron. Miloj da pinglopinglaj lumoj trafis la okulojn; ili maldensiĝis en la malproksimecon, escepte de unu linio kiu pasis regule ĝis la supro de la monteto Gurten. Pli proksime, en la centro de la urbo mem, brilis helaj neonaj vortlumoj; kaj jen proksimege, sur la rando de la balkono, lumigitaj de la multaj helaĵoj, brilis skarlatiaj — aroj da pelargonioj. La sonoj de la danemuziko ankoraŭ aŭdiĝis obtuze el la interna halo, kie longaj mikskoloraj jupoj ĉirkaŭsusuris, en senĉesa irado kaj moviĝado.

Frazo el la Zamenhofa Ekzercaro eĥis tra la menso de la raportanto kaj lin vekis for de la revo: «*Jam estas tempo iri domon!*» Do je preskaŭ la dua matene li adiaŭis tiun neforgeseblan scenon por iri domon kaj dormen.

Pireteknikoj.

Arto manĝi pirojn? Jes, kredeble multaj provis tion je la vespero de la 1-a de aŭgusto, ĉar estis ankoraŭ varmege, kaj piroj estas tre facile haveblaj en Svislando; tamen estis la Svisa Nacia Festo, kiam oni festas la fondiĝon de la Svisa Federacio en la jaro 1291, kaj aliajn pireteknikojn ĝuis la homoj. Raketoj flugis kriante al la ĉielo. Eksplodoj aŭdiĝis ĉe ĉiu stratangulo, kaj subite, surprize, ĉe iu ajn loko, ekŝprucis graciaj fontanoj da brilaj steloj kaj diverskoloraj flamoj.

Eĉ lunoj kvazaŭ floris laŭ la stratoj, ĉar preskaŭ ĉiu infano portis en la mano stangeton, de kies fino pendis lumigita sfera lampiono.

La stratoj estis sen veturiloj, sed ilin bordis dika senfina linio da homoj. Ili atendis; atendis la procesion de gajaj svisoj en belaj naciaj kostumoj, kun muzikistaroj, lampionoj, pireteknikaĵoj ktp. Ilin suplementis ankaŭ multaj esperantistoj en eĉ pli diversaj nacikostumoj.

Berno estis gaja!

Malleviĝas la Verda Standardo.

Ĝis la venonta jaro en Malmö!

Tro baldaŭ alvenis la lasta lago de la Kongreso kaj la *Solena Ferma Kunsido* je dimanĉo, la 2-a de aŭgusto, kun la kutimaj raportoj, dankoj, kaj adiaŭoj.

La 32-a U.K. estis granda emocia travivaĵo, kaj post la organiza fortiĝo de la movado per la rekuniĝo de la malplimulto kun la plimulto en nova, pli granda UEA la vojo estas libera por celkonscia agado.

Al la ekzistintaj prezidantoj de la malnovaj IEL kaj UEA oni prezentis honordonacojn.

Post raportoj de la estraroj de la nova UEA kaj de la Lingva Komitato sekvis tiuj de la diversaj fakaj organizaĵoj: kooperativa, ĵurnalistika, PTT, kuracista, polica, natursciencia, Radio, instruista. S-ro *Malik*, Espe-

ranto-parolisto de la radio-stacio Praha, anoncis la fondon de internacia organizo de kunlaborantoj ĉe Esperanto-radioprogramoj. En Praha regule kunlaboras ĉe la Esperanto-dissendoj 32 geesperantistoj.

S-ro *Malmgren*, la prezidanto de la nova UEA, esprimis la dankon de la kongresanoj al la Loka Kongresa Komitato kaj al la gastama Svislando.

S-ro *Strönne* invitis al la 33-a U.K. en Malmö.


Post adiaŭaj vortoj de la kongresprezidanto s-ro *Buchli* kaj kantado de «*La Espero*», dum la muĝado de la orgeno, malrapide malleviĝis la granda Verda Standardo. Du fraŭlinoj en naciaj kostumoj transdonis ĝin al la reprezentanto de la venontjara Universala Kongreso en Malmö.

*

Jam for estas la 32-a, la unika, unueca, unua postmilita Universala

Imitinda ekzemplo.

Kvankam en San Francisko estas nur eta Esperanto-grupo, niaj samideanoj (kaj precipe la samideaninoj) tie estas tre aktivaj. Sur la apuda foto oni vidas ekspozicion, kiun organizis s-ano C. L. Coss ĉe la Banko de Ameriko en San Francisko. Multaj personoj informigis pri Esperanto dank' al sia laboro. Aliaj fervoraj samideaninoj en la sama urbo estas f-ino H. Wolff, rifuĝintino el Kleve (Germanujo), delegitino de UEA, kaj f-ino L. J. Marshall, fakdelegitino por bahaismo. Ni povas fieri pri tiaj samideaninoj.



Poŝtmarko dufoje transmigris la oceanon.

Ke poŝtmarko dufoje transmigras la oceanon, per si mem ne estas grava fakto. Sed temas pri poŝtmarko, kiun germana samideano malsatanta sendis al nia redakcio, por ke ni interŝange havigu al li paketon da nutraĵoj. Nu, ni ne kolektas poŝtmarkojn, kaj el Nederlando oni ne jam povas sendi paketojn al Germanujo. Tial ni sendis la poŝtmarkon al Usono. Sed de tie ĝi revenis. Pasis jam monatoj, kaj dume la malsatanta samideano vane atendas. Kiu bonkorulo sendos al li paketon? Jen la adreso: Hauptlehrer *Alban Scholz*, Haus 15, (13a) *Ermreuth über Forchheim*, Ofr., Bayern, US-zono.

Kaj ankoraŭ du adresoj de malsatantoj: *Franz Beran*, Karlsstr. 11, *Gauting bei München*, Bayern, US-zono, estas 58-jara forpelito kun 3 infanoj (15-, 13- kaj 5-jaraj); antaŭe li havis butikon, nun li laboras en fabriko, kaj troviĝas en mizera situacio: «*Mi neniam pensis, ke la lastaj horoj de mia vivo estos tiaj.*»

Fritz Lowitzer, Mainzerstr. 12, (22b) *Bingen a. Rh.*, franca zono. — «*Kaj nun ni malsatas, precipe mankas grasajo ... 1937 la Gestapo faris traserĉon de mia loĝejo, ĉar mi estis esperantisto. Feliĉe mi kaŝis ĉion bone, alie mi estus kondukita en la koncentrejon. Sed kiel esperantistoj ni ne volas plendi sed esperi.*»

Edgar von Wahl 80-jara.

La 11-an de aŭgusto forpasis 80 jaroj de post la naskiĝo de la balt-germano Edgar A.R. von Wahl, unu el la pioniroj kaj plej elstaraj figuroj en la movado por lingvo internacia, kiu nun vivas kiel pensita profesoro de fiziko kaj matematiko en Tallinn (Reval), Estonio. Kiel universitata studento li konatiĝis kun Volapük. Poste li fariĝis esperantisto kaj fondis la unuan Esperanto-societon en Ruslando («*Espero*» en tiama Petrograd). Pli poste li okupis sin pri la mondlingva afero precipe teorie. En 1922 li publikigis propran projekton *Occidental*, kiu do en la nuna jaro ankaŭ jam ekzistas 25 jarojn. Tiu projekto estas genie kunmetita kaj impresas kiel natura lingvo romanida, sed ĝi ne sukcesis akiri rimarkindan nombron da praktikantaj adeptoj.

Ni bedaŭras ke s-ro von Wahl iris sian vojon ekster la komunumo de l' esperantistaro, ĉar liaj teoriaj laboroj pri la mondlingvo cetere ne estas senutilaj. Sed tiu bedaŭro ne malhelpas nin, rekonii la meritojn de la grandaĵa jubileanto por nia komunafero kaj direkti al li niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.

La Esp. Unio de Liberalaj Religianoj

okazigis somerlernejon la 27-29 junio, kiam la anoj ĝuis semajnfinojn en *Royhill* meze de la kamparo de Sussex, Anglujo. Krom diskutoj pri diversaj religiaj temoj, la du ĉefaj eroj de la programo estis diskuto pri religia instruado en la lernejoj kaj diservo, kiam pastro W. J. Carter faris elokventan predikon pri la interrilato inter Esperanto kaj liberala religio. Informo pri la Unio estas havebla de s-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London S.E. 22, Anglujo.

Kongreso. Kiel propaganda, feliĉa jamboreo de la Esperanta Popolo ĝi sendube estis elstara sukceso; sed ĉu ĝi sukcesis kiel serioza laborkongreso de la esperantistoj? La laboron Esperantan oni plej bone faras en la hejmoj kaj oficejoj; la tasko de kongreso estas propagandi, praktiki la lingvon, kaj demonstri al la publiko ke Esperanto estas vivanta praktika afero. La 32-a ja faris tion.

Jam nun nova stelo leviĝis super la horizonton: niaj okuloj sin turnas al la 33-a en Malmö, kiu estas okazonta de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1948, kaj al kiu oni povas jam nun aliĝi. Kongreskotizo estas 20 svedaj kronoj, 10 por la edz(in)o, kaj 8 por junul(in)o, ĝis la 31-a de decembro 1947. Kongresa adreso: *33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.*

T. PENDLEBURY.

LIBERA TRIBUNO.

VOJAGEMULOJ, MIGREMULOJ, NATURAMIKOJ!

Venos baldaŭ la tempo, kiam ni denove povos vojaĝi tra la landoj por interkonatiĝi kun homoj de fremda lingvo, de fremdaj moroj, por admiri la laboraĵojn, la artaĵojn kaj konstruaĵojn en fremda lando, por pasigi la ĉiam tro mallongan libertempon de la maro aŭ sur la montaro en rondo de konatoj kaj amikoj de fremda nacio.

Por tiu celo — ni planas ankaŭ interŝanĝadon de infanoj, gejunuloj, gestudentoj k.a. — refondiĝis en Aŭstrio la vojaĝsocio «*Der Wanderer*» (La migrulo), kiu antaŭ la milito okazigis plurajn vojaĝojn al Nordlando, al Parizo, al Mediteraneo, al Palestino ktp. Ĝis nun ne okazis akcidento aŭ disharmonio. La socio estas tute senpolitika. En la estraro estas anoj de la tri partioj, profesoroj, dekanato, direktoro, instruisto, parokestro k.a. Membroj estas jam 3000. Ĉu ne estus utile, fondi similajn societojn en diversaj landoj kaj kunlabore interrilati per Esperanto?

Skribu multnombre aprobon pri la akcepto de Esperanto al la estraro de «*Der Wanderer*» per la adreso: lerneja direktoro Josef Ebner, Graz St. Veit, Aŭstrio.

J. E.

UNO.

Mi bonvenigas la artikolojn pri UNO, sed ŝatus decidon: Ĉu pravas tiuj, kiuj ŝajne opinias ke iu unuigis la naciojn en la *Unuigitajn* Naciojn; aŭ tiuj, kiuj ŝajne opinias ke la Organizo estas memvola kunigo, do: *Unuiginta* Naciaro, aŭ la *Unuigitaj* Nacioj?

REVULO.

KVIN ARTLINGVOJ.

Leginte la artikolon «*Hora est!*» en n-ro 10, mi proponas ke oni traduku Esperanten la disertacion de D-ro Manders kaj eldonu ĝin kiel broŝuron. Eble iuj detalaj, aŭ eble eĉ la kompleta disertacio, estus tre taŭga propagandilo por nia lingvo inter kleruloj kaj sciencistaj rondoj.

B.K.I., Karlovac.

Ĝustigoj.

Usona s-ano *Harald Schroeppel* informas nin ke la noto pri oficiala usona delegito al la U.K. en Bern (Heroldo n-ro 14) estas malĝusta: «*La Usona Registaro elektis nenium kiel delegiton sed anstataŭe sendis leteron ... ke oni ne povas akcepti la inviton de la Svisa Registaro*». S-ro Schroeppel en la nomo de EANA kaj usonaj esperantistoj.

Alia ĝustigo venis al ni de franca Komitato de FET, pri kelkaj nomoj en la artikolo «*Monddiskutoj 1948*» (Heroldo n-ro 11). Laŭ tio, *D-ro Bérard*, ĝen. sekr. de FET, akceptis la Politikan Komisionon nur kiel *privatulo* por pledi la maldekstran demokratian tendencon sed ne la programon de iu difinita partio; cetere nek iu politika partio nek FET lin komisiis por partopreni la mondiskutojn. Krome, s-ro *Chirrol* sciigas, ke li neniam akceptis la postenon de helpsekretario de la Ekonomia Komisiono, ke li eĉ ne estis kontaktita pri ĝi, ke li tute ne scias pri kio temas, ke neniu sindikato komisiis lin al la posteno, ke li protestas kaj rifuzas la postenon. Fine la Komitato de FET deklaras ke ĝi ankoraŭ nenion decidis pri sia partopreno en la Monddiskutoj, kaj ke «*ĉiukaze FET neniam helpas malpacan movadon per Esperanto*».

Slovaka Esperantistaro kongresis

unuan fojon post la milito la 12-13 julio en bela urbo *Turčiansky Sv. Martin*, samtempe kun la dua ĝenerala kunsido de Slovaka Esp.-Societo. Partoprenis pli ol 100 kongresanoj inter ili 30 gastoj el Mor. Ostrava, krome gastoj el Praha kaj Silezio. Saĝon okazis la solena malfermo; poste oni komune vizitis la Esp.-ekspozicion, kiu estis inaŭgurita jam la 15.6. kaj kiu ĝis la kongreso estis vizitita de pli ol 1500 personoj. Sabatvespere interkonatiga vespero kun programo kaj danco. Dimanĉon matene protestanta diservo kun prediko de s-ano pastro Marenčin.

La ĝen. kunsido de SES malfermis la loka pioniro J. V. Dolinsky, menciante la trioblan jubileon: 60-jara ekzisto de Esperanto, 30-a datreveno de la morto de D-ro Zamenhof kaj 40-a datreveno de la apero de unua Esp.-lernolibro por slovakoj. Pri la agado de SES raportis ties prezidanto P. Rosa. Oni decidis okazigi la venontjaran kongreson en *Košice*. La preparajn laborojn de la kongreso faris nia senlaca samideano, vicurbestro D-ro L. Izak.

Italaj Esperantistoj kunvenis

la 3-4 aŭgusto okazis de sia unua postmilita kongreso en *Torino*. Partoprenis kelkaj eksterlandaj gastoj kaj multnombraj italaj samideanoj. Estis reprezentitaj: Itala Instituto de Esperanto (dir. Prof. Corrado Grazzini), Itala Esp.-Federacio (prez. Prof. G. Canuto), Itala Unuiĝo de Kat. Esp.-istoj (prez. pastro Caroli), Itala Laborista Esp.-Asocio (prez. Prof. Guzzi), Itala Asocio de Fervojistoj Esp. (prez. s-ro Bisetti), kaj ĉeestis la itala ĉefdelegito de UEA (kav. Minnaja). La ĉarmaj infanetoj fratoj Minnaja oficiale reprezentis Denaskan Esperantistaron.

Oni vigle diskutis pri aktualaj problemoj. Gravan rezolucion oni akceptis pri enkonduko de deviga instruado de Esperanto en la ŝtatajn lernejojn de la respubliko. Ekzamenojn por kapabligo al instruado aranĝis Itala Instituto de Esp. Resuman raporton pri la kunveno dissendis naciaj radiostacioj. Ĉiuj partoprenantoj ĝuis neforgesablajn tagojn, kaj la kongreso montris ke ankaŭ la itala esperantistaro reviviĝis kaj laboradas.

El *Brescia* oni raportas pri nova kurso de la renaskiĝinta grupo (prez. G. Facchi); la kurson gvidas flino Bordogna.

En *Trieste* okazis soleno por disdono de diplomoj de elementa kaj perfektiga kursoj.

Bergen op Zoom.

Nomo familiara al ni jam de niaj infanaroj, pro konata kanto, sed la 27-an de julio multaj esperantistoj la unuan fojon ankaŭ persone konatigis kun tiu mezepoke fama urbo, okaze de la inaŭguro de *memortabulo sur la Esperanto-monumento*. Tiu ĉi monumento, bele situanta ĉe la krucpunto de pluraj aleoj, kaj ĉe la rando de ĉarma parko, restis konservita dank' al ruzeco de lokaj samideanoj. Kiel gastoj ĉeestis ĉ. 60 eksterurbaj ĝeesperantistoj el Nederlando kaj Belgio. La programo estis riĉenhava, kaj la tuta tago estis plene okupita per diversaj promenadoj, meso, ĥorokanto, rigardado de vidindaĵoj, paroladoj, manĝoj kaj aliaj arandoj. La gastoj povis konstati ke la gesamideanoj en Bergen op Zoom estas viglaj, kaj ke la urbo, kvankam negranda, estas vivplena kaj societema.

La riparo de la monumento kostis gld. 369.40; kiu volas helpi por likvidi tiun sumon, bv. ĝiri sian obolon al n-ro 28.65.57, je nomo de J. Dercks, Bergen op Zoom.

Jubilea soleno en Hannover

fariĝis granda sukceso, tiel ke de diversaj flankoj ni aŭdis pri ĝi entuziasmajn vortojn. Pli ol 500 personoj, inter ili multaj eminentuloj, ĉeestis la feston, kiu okazis kun partopreno de konataj artistoj en salono de la firma Hanomag. Univ. Prof. D-ro Saribek Agamjan el Irano parolis en Esp. pri la temo «*Esperanto la ponto al la mondo*». Radio Hamburg disaŭdigis partojn el la soleno.

Rezulto de la festo estis Cseh-kurso, gvidita de s-ro Weide (senpage disponigita, por tiu kurso, de la urbo Hamburg), kun 130 partoprenantoj.

Ankaŭ el aliaj urboj en Germanujo atingis nin raportoj pri vigla Esp.-agado. Tio pruvas denove ke la 12-jara persekutado de nia afero (la malamika sintenado efektive komenciĝis jam en 1933) ne povis esti atingi la fajron de nia ideo en la koroj de la germanaj samideanoj postvivintaj, kiuj malgraŭ malsato, manko de lernolibroj kaj sub grandaj malfacilaĵoj fervore rekomencis la laboron tuj post la falo de la nazi-reĝimo.

Li volas kvarpiedule rampi tien ...

kiam LEEN en la venonta jaro denove aranĝos someran kurson, kaj se ne ekzistos alia ebleco por alveni! deklaris unu el la ĉeestintoj de la nunjaraj kursoj. Tiel entuziasmitaj li kaj la ceteraj partoprenintoj estis. Sendube la unuaj someraj kursoj, kiujn organizis la nederlanda Esp.-asocio «*La Estonto Estas Nia*» en *Kerk-Avezaath* ĉe Tiel, bonege sukcesis. Partoprenis 30 personoj, kiuj senescepte estis tre kontentaj pri la lecionoj, la restado (16-23 julio) en konferenceto «*Weltevreden*» kaj pri la vetero, kiu estis tiom bela, ke la frukulto de la lecionoj povis okazi en la plukarbojo. Kursgvidintoj estis f-ino H. M. Mulder kaj s-ro A. J. Kalma el Amsterdam kaj s-ro G. Aström el Gefle (Svedujo).

Esperanto-Pokalo por piedpilkistoj.

Okaze de la 60-jara Jubileo de Esperanto, la katolika, kristana kaj laborista Esperanto-kluboj de *Eindhoven* en Nederlando disponigis «*migrantan (intersangan) pokalon*» por somerverperaj piedpilkaj konkursoj. Tio samtempe estas nemultekosta propagando, kiun imiti estas rekomendinde.

Ni recenzas.

Malmö jam aŭdigas sian voĉon.

Apenaŭ la 32-a U.K. finiĝis, kaj jam flugis sur nian redakcian tablon la unuaj reklamiloj por la 33-a U.K. en Malmö: 1. ilustrita *faldprospekto* kun Esp.-teksto pri la sveda provinco Skanio kaj pri Malmö, ĝia plej grava urbo; 2. *broŝureto pri Malmö* kaj la kongreso (kotizoj, restado, ekskursoj ktp.); 3. *Aliĝilo*. — Sufiĉa adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

Jarlibro 1947 (unua parto) IEL-UEA, 250 p., kutima formato (11,5 x 15 cm.). Eldonis Univ. Esp.-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

«*Por la unua fojo tiu ĉi Jarlibro montras kunigitajn nomojn de Internacia Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio*,» komencas la prezidanto s-ro L. Bastien sian Antaŭparolon, kaj oni povas kunsenti lian antaŭgojon, se en Bern lian prezidantecon finkronos tiu kunfandiĝo. Nun en Bern la kuniĝo fariĝis fakto, kaj la ĝojo de la maljuna pioniro kaj de l' esperantistaro certe estas ankoraŭ pli granda.

Cetere la Jarlibro denove prezentas la riĉan enhavon jam kutiman, el kiu precipe la adresa materialo (nur por uzo de membroj!) estas tre valora. Ni trovas 1117 delegitojn, 190 vicdelegitojn kaj 887 fakdelegitojn, kune 2194 delegitojn en 50 landoj.

Nunjare, pro diversaj cirkonstancoj, la Jarlibro aperis nur en la fino de junio; espreble en la venonta jaro ĝi, ankoraŭ pli ampleksa, atingos la membrojn jam antaŭ pasko.

Diversaj novaj libroj, recenzotaj en pli postaj numeroj: Theo Thijssen, La nevenkebla ĝeno; Novaj Esperanto-historietoj de diversaj aŭtoroj; Tri majstronoveloj; Feuillet's Encyclopédiques de Documentation Espérantiste; A. de Silva, Historio de Usono; Frank Booth, Arboj de la arbaro kaj kampo; diversaj tekstoj pri filmstrioj; Kio estas Socikredito; Grundsätze des Fremdsprach-Unterrichts, Esperanto 60-jara; Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj.

Esperanto en la gazetaro.

John Bull, konata ilustr. revuo angla, London, 19.7. Enhavas unu el la plej interesaj artikoloj iam verkitaj pri Esperanto, sub titolo «*John Hoyle world citizen*» (J. H. mondĉivitano), verkita de Dennis Bardens. Kun portreto de John Hoyle kaj reprodukto de kovreto kun diverslandaj poŝtmarkoj en originalaj koloroj. La artikolo temas pri la mond vasta peresperanta korespondado de John Hoyle: «*Jen estas la historio de viro kiu, helpe de Esperanto, konstruis sian propran Ligon de Nacioj.*»

Neue Berner Zeitung jam antaŭ la U.K. kaj dum ĝia tuta daŭro enhavis artikolojn pri Esp. kaj la kongreso, tutan paĝon en la numero de 27.7. kaj artikolon kun 6 ilustraĵoj pri la kongreso en la eldono *NBZ am Sonntag* de 3.8. Unu el la redaktoroj de N.B.Z. estas nia s-ano D-ro A. Baur.

Esperanto-Radio-Kalendaro.

Ne atingis nin novaĵoj pri la Esperantaj elsendoj; tamen ni intencas, en la venonta numero denove publikigi la Kalendaron.

Tre interesaj estis la ĉiutagaj elsendoj dum la U.K. en Bern, kiun prizorgis D-ro A. Baur, redaktoro de «*Neue Berner Zeitung*». Cetere lia voĉo estis ĉiam tre klare komprenebla. Ankaŭ la intervjuitoj ĝenerale estis bone kompreneblaj, kvankam kelkaj voĉoj (ekz. tiu de nia fama Julio Baghy) sonis iom strange per la radio. Estis nur bedaŭrinde ke, malgraŭ niaj klopodoj aperiĝi Heroldon de 1.8. unu semajnon pli frue, la presisto ne sukcesis frutempe ekspedi tiun numeron al la abonantoj, kaj sekve nur malmultaj legantoj aŭskultis la ĉiutagajn elsendojn.

Novan Esperanto-diskon

eldonis U.E.F., 34 rue de Chabrol, Paris 10. La disko surhavas sur unu flanko kanton «*Eterna malĝajeco*», laŭ muziko de Chopin, kantitan de s-ino Sautreuil, kaj sur la alia flanko Monmartran kanzonon «*Nenio kaj io*» de Raymond Schwartz. La Franca Radio jam sendis la diskon al diversaj radiostacioj, ekz. Brno, Budapeŝto, Hilversum, Lisbono, Londono, New York, Praha, Roma, Sofia, Warszawa k.a. Radio-aŭskultantoj petu la staciojn ke ili disaŭdigu la diskon.

Filmstrioj kun Esperanto-teksto.

Jen novaĵo, kiun certe multaj kluboj aklame akceptos por vigligi siajn kunvenojn dum la venonta vintro. La filmstriojn eldonis Projekcia Instrua Centro en Nijmegen Ubbergen kaj la tekstojn tradukis speciala Esperanto-Filmgrupo, Antwerpschestraat 45, Bergen op Zoom, Nederlando. El landoj, el kiuj estas eble pagi al Nederlando, oni povas mendi la filmstriojn kun tekstoj ĉe la Libroservo de Heroldo, sed oni atentu pli detalajn klarigojn en venontaj numeroj.

Okazos:

la 4-an de oktobro, je 15 h., *inaŭguro de la nomŝildo «Esperantolano»* ĉe la angulo de Velperweg kaj Esperantolano en Arnhem, Nederlando. (Kolektiĝis por ĝi ĉ. 100 gildanoj.) Parolos reprezentantoj de la urba estraro, de NCKE kaj de la Arnhem-Asocio Esperanto-kunlabora komitato;

la 12-14 oktobro *Internaciaj Fieraj Esperanto-Kursoj* en la Sporta Altlernejo en *Vejele*, Danlando. Prospekton oni povas peti de L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando;

la 30-an de majo 1948 grava regiona *Esperanto-Kongreso Normandia* en Fécamp. Oni povas aliĝi ĉe s-ro Delamare, 32 rue Alexandre-Legros, Fécamp (S.I.), Francujo.

ANONCETOJ

Naskiĝo Viti. — Al ges-anoj Viti-Galeotti, membroj de UL en *Messina* (Italujo), Via 24 Majo 21, naskiĝis fileto Pietro Paolo Antonio. Koran gratulon!

Naskiĝo Moen. — La 7-8. naskiĝis al ges-anoj P. Moen-Molenaar, Schaarsbergenstr. 104, *Den Haag*, Nederlando, tria filino, nomita Marianne. Ni kore gratulas.

Fianĉiĝo Mayer-Kondor. Nia malnova samideano, gimn. profesoro D-ro J. Kondor en *Nyiregyhaza*, Hungarujo, fianĉiĝis la 2.8. kun komencanta esperantistino Aniko Mayr. Koran gratulon!

Edziĝo Petri-Gelzman. — La 16.8. geedziĝis en *Eskilstuna*, Svedujo, s-ano Rudolph Petri kun pola-juda esperantistino Bronia Ester Gelzman el Lodz. Koran gratulon!

Edziĝo Bracci-Cheli. — La 10.9. geedziĝis en *Suvereto*, Italio, nia samideano D-ro Piero Bracci kun f-ino Rosalba Cheli. Ni kore gratulas.

Doktoriĝo. S-ano J. Kondor, gimnazia profesoro en *Nyiregyhaza*, Hungarujo, akiris la 12.7. doktoran diplomon en la Universitato de Debrecen pri lingvoj klasikaj. Ni kore gratulas.

Letervespero. La AEF-grupo «*Verda Stelo*» en Vien aranĝos letervesperon kaj petas ĝeesperantistojn el la tuta mondo, alsendi leterojn kaj bildkartojn. Certa respondo. Bonvolu sendi al la adreso: A. Grabner, Bräuhausgasse 73/4, Wien V., Aŭstrio.

Letervespero. Nova Esperanto-klubo aranĝos letervesperon en la fino de oktobro. Skribu amase! Slagelse Esperanto-klubo, Jernbanegade 14, I., *Slagelse*, Danlando.

Franco 23-jara, 1.92 metron alta, bruna, ateista, naturista, altmorala, legema, sportema, varmlande vojaĝema, sed malriĉa, *deziras korespondi pri edziĝo* kun junulino 18- ĝis 23-jara, minimume 1.75 m. alta, kiu havas samajn ideojn, emojn kaj idealon. Potiron, 7 rue Marchand, *Vannes (Morbihan)*, Francujo.

Instruistoj, ĝejnuloj! Mi bezonas por nacilingve eldonata libro originalajn fabelojn kaj rakontojn el via nacia lingvo. Jozefo Tichy, Ludové nám. 1, *Bratislava*, Ĉeĥoslovakujo. (40)

Esperantistoj! Aĉetu viajn plantojn, florbulojn kaj arbustojn ĉe s-ano H. de Water, Vijzelstraat 203, *Scheveningen*, Nederlando. Petu ilustritan prospekton! (38)

Deziras aĉeti ekzempleron de unuaj Esperantaj lernolibroj eldonitaj de D-ro Zamenhof en 1887; pagos malavare. Charles Chomette, 8525 Saturn St., *Los Angeles 35*, Calif., Usono. (39)

Egipta malnova samideano, 33-jara fraŭlo, scianta tre bone la araban, anglan kaj francan lingvojn, serĉas ian ajn okupon eksterlande. Volonte prelegos pri Egiptujo aŭ gvidos Esperanto-kursojn. Kiu povas helpi? D-ro Tador Megalli, P.O. Box 450, *Kajro*, Egiptujo. Esperantaj gazetoj bonvolu represli.

Herbert Demuth, Pastorenweg 62, *Bremen*, Germanujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

EKZAMENU VIN MEM!

Novaj demandoj kaj taskoj.

86. Kiu lando eldonis poŝtmarkon okaze de la 50-jara Jubileo de Esperanto? En kiu jaro tio estis?

87. Nomu la antaŭnomojn de la jenaj konataj esperantistoj vivantaj aŭ mortintaj: a) Kalocsay, b) Kreuz, c) Nylén, d) Petit, e) Privat, f) Schwartz, g) Stettler, h) Thilander, i) Warden.

88. Serĉdemandoj: a) Kiu kokerikas pli laŭte ol kokerikanta koko? b) Kiajn plumojn havas kokerikanta koko?

89. Flucia geografia silab-enigmo: El la sekvantaj 28 silaboj oni devas formi 7 kvarsilabajn vortojn, kies komenciliteroj nomas titolon, kiun la esperantistoj ofte donas al D-ro Zamenhof. La vortoj signifas: 1. Urbeto konata pro hazardludoj; 2. Kontinento; 3. Lando en Azio; 4. Sudamerika ĉefurbo; 5. Pacifika insulo; 6. Bela regiono apud la Mediteraneo; 7. Sudamerika riverego. La vortoj havas la Esperantan formon. Jen la 28 silaboj:

a a e g o h i j a j o k a r k o k o l o m e m o n n u o o p a r i r i r o s a n t a t e t i t i v i.

90. Kiuj Universala Esperanto-Kongresoj okazis en Usono (en kiuj urboj kaj kiam)?

Enigma-Konkurso.

Novan konkurson ni publikigos en la sekvonta numero. Jen la solvo de la konkurso n-ro 13 (krucvort-enigmo). Por ŝpari lokon, ni indikas nur la horizontalajn vort(ero)jn:

step o pioĉo tulip opi provi el pepa nulo al pik rezigni pli per r l u kio lam pup urs rob kameo ata la obeliskoj bo sof linio oni rip sal ano buŝ l d (aŭ j) k orf fum butonum dig at rapo avar la ripet lip pavim skol n (aŭ d, g, ĝ, l) piko.

Eksterordinare granda nombro de gesamideanoj partoprenis la konkurson n-ro 13, nome 73 el 21 landoj; 48 el 15 landoj ĝuste solvis la enigmon, 25 solvoj el 16 landoj estis neĝustaj. Pro la granda nombro de ĝustaj solvoj ni aldonis kelkajn pliajn premiojn; la aldonitaj premioj konsistas en: 6. kaj 7. Sub la signo de l' Espero; 8. La lingvo de la bestoj, plus: Rubezahl. Jen la premiitoj:

1. J. Marik, Praha, Ĉeĥoslovakio.
2. B. Klakočar, Karlovac, Jugosl.
3. D. Saville, Vancouver, Kanado.
4. Fr. Gonzalez, Montbuy, Hisp.
5. R. Milon, Brive, Francujo.
6. F-ino J. Ensink, Olst, Nederl.
7. H. Feltendal, Vejele, Danujo.
8. N. Pascha, Bergen N.H., Nederl.

Theo Thijssen: La nevenkebla ĝeno

Jus aperis nova *FLE*-libro: «*La nevenkebla ĝeno*» (Het taabe ongerief), de Theo Thijssen, bone bindita, 319 paĝoj, tradukita de F. Faulhaber. — Prezo gld. 4.90, ĉe la Libroservo de Heroldo.